

LA LASTA TENTO

HOMILIO PUBLIKIGITA EN LA REVUO ADISTA LA 30AN DE OKTOBRO 2010

“Fininte la tutan tentadon, la diablo foriris de li ĝis estonta tempo”(Lk. 4,13). Estas per tiu ĉi enigma frazo ke Sankta Luko finas la rakonton pri la tri tentoj de la diablo al Jesuo en la dezerto. Nun alvenis la favora okazo, kaj la diablo revenas provi denove Jesuon per aliaj tri tentoj kiuj reeĥas tiujn de la dezerto. Se Li estus akceptinta liajn konsilojn, Jesuo nun ne estus fininta tiel alnajlita al eŝafodo kiun oni destinas al malbenitaj de Dio (Read. 27, 26). La diablo, fakte, sin prezentis al Jesuo kiel efika helpanto; li estis invitinta Lin utiligi Liajn kapablojn pro siaj bezonoj mem, ŝanĝante la ŝtonojn en panon por satigi sian malsaton (Lk. 4,6), kaj utiligi la povon kaj la gloron de ĉiuj regnoj de la tero, diablajn proprajojn kiujn la diablo estus estinta dispona meti en Liajn manojn por inaŭguri sian regnon (Lk. 4,6), kaj precipe esti la okulfrapa Mesio kiun la popolo atendis, por atingi tiamaniere la entuziasman apogon de la popolamasoj (Lk. 4,9).

Sed Jesuo, neŝanceligebla, ĉiufoje kontraŭmetis sekan rifuzon. Li neniam estus utiliginta siajn kapablojn mem por savi sian vivon, sed por ĝin komuniki al aliuloj. Lia regno estus havinta nenian rilaton kun la povo kaj la riĉeco, sed ĝi nur rilatos kun la amo kaj la servado. Kaj Li neniam estus irinta renkonte al la atendoj de la popolo, sed ilin Li estus ŝanĝinta.

Kompleta malsukceso. La popolo Lin rifuzis, vidinte ke Li ne estas la atendita Mesio, la triumfanta Kristo, kaj nun la popolo mem ĝuas la spektaklon de la “reĝo de la Judoj” agonianta sur la eŝafodo. En Nazareto Liaj batalemaj kunvilaĝanoj klopodis Lin mortigi, kaj ili ne sukcesis tion fari (Lk. 4,29-30). Sukcesis tion fari la piaj loĝantoj de Jerusalemo, la Sankta urbo, kaj ĉifoje por Jesuo ne estas ebleco de saviĝo.

Nun, kiam ĉiuj estas kontraŭ Jesuo, la diablo kaptas la okazon, tiu estas lia favora momento, kaj, kiel en la dezerto, li reproponas al Kristo ununuran lastan tenton: Sin savi!

Tiel fariĝas instrumentoj de la diablo la regantoj kiuj priridas la krucumitan Jesuon: “Aliajn li savis!: Li savu sin mem, se ĉi tiu estas la Kristo de Dio, la elektito!” (Lk. 23,35). Sed la elektiton (Jes. 42,1), ŝajne, oni forlasis (Lk. 24,21).

Ankaŭ la soldatoj mokas Jesuon, eĉ la profesiuloj pri morto kiuj donas al la krucumita homo la vinagron, la simbolon de la malamo. Al ili, la regantaj paganoj, ne interesas la historioj de la Judoj, kaj ke la komdamnito estas aŭ ne estas la Kristo. Ili lin ekzekutis ĉar li pretendis esti ja “la reĝo de la Judoj mem”, kiel estis bone indikite en la mokema skribaĵo kiun oni metis sur la krucon (“la reĝo de la Judoj estas tiu ĉi”).

Tia estas la sorto de tiuj kiuj kuraĝas defii Romon.

Neniu solidaras kun Jesuo. Li havas ĉiujn kontraŭ si. La popolo, la regantoj, la soldatoj, vere ĉiuj. La malamo al li estas tiom granda ke eĉ unu el

la krimuloj, kiu estas krucumita kiel Li, ofendas Lin: "Ĉu vi ne estas la Kristo? savu vin kaj nin" (Lk. 23,39).

Sed Jesuo ne savas sin mem.

Tiu ĉi ne estis Lia misio. Li "venis por serĉi kaj savi la perditaĵon" (Lk. 19,10), li ne venis por savi sin mem.

Tamen, kiam Jesuo tuŝas permane la rifuzon de sia vivpropono, iu kaptas lian amon. Ne, tute ne temas pri popolano kiu spektas la suferon. Eĉ tute ne temas pri iu el la regantoj kiuj lin mokas. Des malpli temas pri iu el la soldatoj. Ne! Temas pri iu el la kondamnitoj kiel Jesuo, temas pri iu kiu dum sia tuta vivo faris nur malbonaĵojn, kaj faris multe da ili, eĉ tro por meriti fini sian vivon pendigite el tiu terura torturilo. Li estas krimulo. Neniu povus esti pli ol li malproksima de la Filo de Dio. Tamen, ĝuste ĉar la Filo de Dio ĉiam estis rekonita kaj akceptita de la plej malproksimaj el la religia kaj morala mondo, la krimulo sukcesas rekonu en Jesuo la atenditan reĝon: "Jesuo, memoru min, kiam vi venos en vian regnon" (Lk. 23,42). Kiu sin turnas al Jesuo estas kanajlo sen iu ajn merito, sed li komprenis ke la Kristo ne konsideras la virtojn de la homoj, sed li konsideras iliajn bezonojn (Lk. 18, 9-14).

Estas Jesuo kiu ĉiam donacas multon pli ol oni povas peti aŭ deziri, Li ne memoros lin kiam Li venos en Lian regnon, sed Li tien akompanos lin: "Hodiaŭ vi estos kun mi en Paradizo" (Lk. 23,43).

Kun mi... kiel la ŝafo metita sur la ŝultrojn de la paŝtisto (Lk. 15,5), la bandito eniras la Paradizon, loko de la pleneco je vivo, kun Jesuo, kaj, ekde tiu ĉi momento la Paradizo estos malfermita por ĉiuj kiuj rekonas Jesuon kiel ilian savanton (reĝon), kiu ajn povus esti estinta ilia konduto.

Alberto Maggi